



Pos-Amiko

Printempo 2022, numero 40

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Nuligo de IJK ne okazos
1. Italujo malpermesas matenmanĝon
2. Granda aŭkcio dum Malferma Tago
3. Kara Koko
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Nuligo de IJK ne okazos

La estraro de TEJO ĉi-semajne publikigis ŝokan novaĵon, ke en 2022 ne okazos la tradicia nuligo de la IJK. Jam dum multaj jaroj la membroj de la asocioj kutimas aliĝi por kongreso, ekhavi altajn esperojn, kaj poste rezigne akcepti digitalan alternativon, sed ĉi-jare pro ŝanĝitaj ĉirkonstancoj tio ne povas okazi.

La junularo, mense preta por sekva reta IJK, nun subite havas la defion vere aĉeti vojaĝbiletojn, kaj eĉ bezonas ŝpari monon por pagi plenajn loĝ- kaj manĝkotizojn. Kelkaj junuloj jam aĉetis bonan ekranon kaj komfortan seĝon por la sekva reta renkontiĝo, kaj tiaj elspezoj nun evidentiĝas superflujaj.

Fine lokaj kluboj kaj landaj sekcioj, kiuj ne kalkulis je neokazo de la nuligo, misplanis siajn merkatumajn strategiojn: iliaj kampanjoj lastatempe ĉefe celas retumantajn, hejmrestemajn junulojn, ne vojaĝemulojn. Kio ja okazos, se tiaj homoj amase venos al IJK? Ĉu la tuta koridoro plenos je komputilumantoj, anstataŭ nur Joop kaj Robin?

Italujo daŭre malpermesas matenmanĝon

Kio origine estis portempa leĝo por ekonomia krizo, tio nun iĝis kultura heredaĵo por tuta lando. Antaŭ pli ol cent jaroj, en la malfacilaj tagoj de mondmilito, la registaro enkondukis oficialan limigon de ne pli ol du manĝoj en la tago, por ŝpari valorajn

rimedojn en milita tempo. Pro la itala amo al pastaĵo preskaŭ ĉie la popolo decidis rezigni pri la matenmanĝo.

Post la milito la malpermeso restis, unue pro ekonomiaj problemoj, poste pro lobiado de la pastaĵa kaj pica industrioj, kiuj ne volis konkurencon de tria manĝo en la tago. Pro matena malsato italaj soldatoj malvenkis en multaj bataloj, kaj tial kreiĝis la kutimo manĝi matene biskvitojn (kiuj ne kalkuliĝas kiel vera manĝo).

Post la dua mondmilito denove Italujo ne sukcesis forstrecki la leĝon, ĉar al la lobiado pora ĉi-foje aliĝis ankaŭ la biskvita industrio. Eĉ standardigo de leĝoj pro membriĝo en la Eŭropa Unio ne helpis, ĉefe ĉar neniu alia lando eĉ konsideris havi leĝon kontraŭ matenmanĝo. Komence de 2022 Italujo finfine pretiĝis por finfine permesi verajn panajn aŭ cerealajn matenmanĝojn, kaj jam antaŭmendis amason da greno el Ukrainujo. Bedaŭre ankaŭ tiu ĉi provo devas esti prokrastita.

Granda aŭkcio dum malferma tago

La baldaŭa Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, eble la lasta okazonta en ĝi, promesas sian kutiman lulefikan programon, sed ĉi-jare ne ĉio estas ekzakte tia, kia ĉiam. En la programo ne estas nur prelegoj pri la movado, sed ankaŭ prelegoj pri la konstruaĵo, ĉiĉeronado tra ĉiuj ĉambroj, komuna ordigado de la ĝardeno, kaj informado pri la ekonomiaj avantaĝoj de oficejo en la centro de Roterdamo. Fine de la tago kiel pli ofte okazos aŭkcio, en kiu aĉeteblos valoraj libroj, suveniroj de antaŭaj kongresoj, oficejaj seĝoj kaj komputiloj, kaj fine la CO mem.

Tion eksciis la Pos-Amiko per anonima fonto:

Poso: “Kial aldoniĝis fine de la aŭkcio la vendo de la CO?”

M.S.: “Ĉar se ĝi aldoniĝus komence, kaj ni vendus ĝin sed ne la seĝojn, ni ne havus spacon por stoki tiujn.”

Poso: “Klare. Kiom vi esperas enspezi?”

M.S.: “Por la libroj simple ne plu stoki ilin jam estas gajno. La domo mem disfalas kaj ne multe valoras, sed ĝi okupas multekostan areon en la mezo de urbo, kie eblas meti ekzemple meblovendejon aŭ kanabejon.”

Poso: “Kiu esperantisto aĉetus la oficejon?”

M.S.: “Mi tre ĝojus, se la konstruaĵo povus resti en la movado, en la manoj de iu riĉa verd-korulo, sed mi ne tro esperas. Ja por riĉiĝi oni bezonas agi malempatie kaj fajfi pri idealoj, kaj ĉu tio priskribas ajnan esperantiston?”

Kara koko...

“Kial ekzistas dumviva membreco, sed ne dumviva IJK-aliĝo?”

Kara homo,

Kelkaj homoj ŝatas la ĉiujaran riton remembriĝi en asocio, kaj aliĝi por la sekva IJK. Aliaj preferas laŭeble aŭtomatigi ĉion en la vivo. La ideo de dumviva IJK-aliĝo ŝajnas bela, sed tio ne tiom facilas.

Ne ĉiuj IJK-oj same bonas kiel tiu de 2022, kaj la ĉiujara varbado por aliĝoj estas mezurilo por la kvalito de la oferto kaj la talento de la organiza teamo. Se homoj ĉiuokaze jam estus aliĝintaj, kial ne simple lui iun betonan studentan domon sen naĝejo, kilometron for de la manĝejo?

Poso

NEJ-

Novaĵoj!

[Aliĝu nun al KKPS!](#)

La Klaĉ-Kunveno Post-Somera en 2022 okazos en la konata gastejo Kruithuis en Delft, Nederlando denove. Iru al kkps.esperanto-jongeren.nl kaj tuj aliĝu! Informoj, kotizoj, kaj aliĝilo ĉiuj jam pretas, nur mankas via nomo.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Amikoj ne lasas amikojn maltrafi la duan IJK-aliĝperiodon.

Taŭro: La plej danĝera ludo: trinkoludo dum trinkomanĝa nokto.

Ĝemeloj: Aĉetu malmultekostan rusan tankon por ornami ĝardenon.

Kankro: Ĉu vi jam pretigis vian muzikliston por la IJK-karavano?

Leono: Aĉetu belan seĝon, tapiŝon aŭ oficejon por via patrino.

Virgulino: Post friulumado vi ne plu estos.

Pesilo: Vi grimpas en la montoj kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi gajnos du nobelpremiojn ĉi-jare.

Manuela: Ĉiuj puzleroj falos por vi en la ĝusta direkto. Ne paniku.

Sagitario: Uzu vian kreativecon, desegnu proprajn monbiletojn.

Kaprikorno: Neniu malpermesas vin manĝi matenmanĝon vespere.

Akvisto: Ĉi-paske ne farbu ovojn, farbu la kokon mem.

Fiŝoj: Protektu vian ĝardenon kontraŭ ĝenaj junuloj per la Himno.

Aliĝu nun, aŭ por ĉiam bedaŭru

Ne plu ekzistas pretekstoj. Ne plu ekzistas duboj. Ekzistas nur unu revo: iri al la IJK.



IJK 2022 NEDERLANDO

De Roerdomp - Westelbeers

Ĉiuj gravaj homoj jam aliĝis, krom vi. Aliĝu nun. Ĉesu pagi por gaso aŭ nafto, kaj ŝparu rapide monon por la IJK. Vidu jen, kiom malmulte vi bezonos:

	11-18	19-26	27-35	35+	Loĝado		Karavanoj		Matenmanĝo	2 €
A	40 €	60 €	90 €	120 €	Luksete	50 €	De Germanujo	25 €	Tagmanĝo	6,5 €
B	25 €	45 €	75 €	105 €	Amase	35 €	De flughaveno	20 €	Vespermanĝo	3 €
C	10 €	30 €	60 €	90 €	Tende	20 €	Nur la buso	7,5 €	Tuta semajno	74 €

Kaj kion vi ricevos kontraŭ tio?

- Semajno inter **junaj esperantistoj el la tuta mondo**, el kiuj kelkaj eĉ estas normalaj.
- Grandega kongresejo kun propraj **naĝejo, herbejoj, sportejo, trinkejo** kaj multaj kaŝlokoj.
- Plenplena programo kun prelegoj, kursoj, konkursoj, **elstaraj koncertoj kaj unika muzikalo**.
- Ekskursoj al ĉirkaŭaĵo, al **Amsterdamo, Roterdamo**, la enklavo Baarle kaj **Antverpeno**.
- Trinkejo kun **frititaj manĝoj**, gufujo kun kandeloj kaj ludoj, diskejo kaj karaokeo.
- **Ĉiutage Pos-Amiko**.
- Amika, sperta teamo da helpantoj, kiuj solvos ĉiujn viajn problemojn.

Nuligu ĉiujn viajn aliajn planojn, rezervu de la **20-a ĝis la 27-a de aŭgusto**, kaj ekplanu vian vojaĝon. Ĉar kiel vi klarigus al viaj infanoj, ke vi maltrafis la legendoplenan kongreson de 2022?

ijk2022.tejo.org